

Heinrich Heine,  
 Milde fluas tra la kor'  
*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'  
 kanto primavera.  
 Flugu, melodi-sonor',  
 en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',  
 super domoj flutu.  
 Se troviĝos tie roz' –  
 ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft”  
 de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
 en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de  
 s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto  
<http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>  
 . Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.*

Heinrich Heine,  
 Softe vibras tra l'anim'  
*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l'anim'  
 melodi' tenera,  
 flugu al la malproksim',  
 kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',  
 kaj se tie ĉarme  
 ridos roz', en mia nom'  
 ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft”  
 de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
 en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano  
 Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)*

*El la poezia volumo “Kanzonoj de Heine”*